

Felo 2



LA ROMPANTOJ

(Kvin molonogoj)

ORIGINALE VERKITAJ

DE

FREDERIKO PUJULA-VALJES



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodríguez San Pedro 13 - 2ª - 7. E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4466076

Librejo HACHETTE KAJ K^o

79, Boulevard Saint-Germain, PARIS

KAJ ĜIAJ KORESPONDANTOJ :

DANUJO, ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, Bredgade 35, KJÖBENHAVN.

GERMANUJO, ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 95, BERLIN.

GRANDA BRITUJO, REVIEW OF REVIEWS, Mowbray House, Norfolkstreet, LONDON W. C.

HISpanUJO, J. ESPASA, 579, Calle de las Cortes, BARCELONA.

ITALUJO, R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO.

RUSUJO, M. ARCT, 53, Nowy Swiat, WARSZAWA.

SVEDUJO, ESPERANTISTEN 37, Surbrunnsgatan, STOCKHOLM.





AL LA LEGONTOJ

La jenaj monologoj estis jam komposititaj kaj envolumigitaj sub la titolo « La Rompantoj », kiam oni rimarkis, ke en unu el tiuj monologoj la protagonisto nenion rompas. Ni mire demandis nin mem, kial ni enmetis en tiun kolekton, kiel rompanton, la « Okaza Artisto », kaj ni ne sukcesis trovi kontentigan respondon.

Eble oni opinios, ke, el ĉiuj rompantoj, tiu malsprita dormemulo estas la plej rompema, tial ke, kvankam li rompas nenian materialan objekton, li tamen petolante rompas, frakasas, difektas, pecigas, eĉ atomigas la belegajn kreitaĵojn de la plej gravaj pensuloj! Eble pro tio ni instinkte kaj senpripense lin enmetis inter la rompantojn, eble ankaŭ pro tio, ke, nenion rompante, li rompas per sia nerompo la homogenecon, kiu devas esti en ĉiu kolekto de samspecaj aferoj?


Ĉiukaze la legontoj tamen nin pravigos, kiam ni certigas, ke « Okaza Artisto » estas ankaŭ rompanta viro. Ĉar, se ili akceptas, ke li rompas, ni interkonsentas; kaj, se ili tion ne akceptas kaj ekprovas pruvi sian opinion, tiam ili konstatos, ke la Artisto estos kaŭzo, ke ili al si rompos la kapon por diveni kaj analizi aferon, kiu infine ne valoras eĉ buŝon da fumo de la frakasita pipo de la « Pipamanto ».

Lasinte do la « Okaza Artisto » en la kolekto, ni konsilas la legontojn, ke ili ne tro pripensu la aferon, kaj al ili ni deziras, ke gaja rido rompu ilian enuon..., se efektive ili ne por ĉiam tedigis jam de la legado de ĉi tiuj sensencaj klarigoj.

F. P. V.



SENHEJMULO



Fot. Ch. Véra.

«... mi domen iras, vi — sur tiu
strato restas... »



SENHEJMULO¹

Strato. — Sur tero kuŝas botelo rompita; apud ĝi, marĉo da vino. Li restas senmova... laŭ eble!... rigardante la malfeliĉaĵon. Li estas vestita per ĉifonaĵoj, kaj lia ruĝa nazo denuncas lin, kiel ebrulon. Certe li multe kutimas drinki kaj multe drinkis dum la nuna vespero.

Li kantas per raŭka voĉo :

Bela botelo aŭdu,
Mi domon iras, vi
Sur tiu strato restas
Pfu! Pfu! Pfu! Pfu!

(Muziko el LA BOHEMO.)

(Li eltiras el sia poŝo cigaredpaperon, kiun li gluas sur sian mal-supran lipon. Poste li elĉerpas tabakon el ĉiuj siaj poŝoj kaj kunrulas cigaredon. Certe li multe penadas por ĝin kunruli, sed ankaŭ pli multe por bruligi alumeton trovitan de li en unu el siaj vestaj poŝoj. Fine li atingas la nefacilan celon froti alumeton sur la ledplandojn de siaj ŝuoj. Eble tero turniĝas! — Li ploretas.)

(Al publiko.) Eble vi pensas, ke mi perdis filon!... Vi eraras!... Eble vi pensas, ke mi perdis filinon!... Vi ankaŭ eraras!... Eble vi ĝin pensas tial, ke vi vidas min malgaje ploradeti!... Jes vi estas pravaj : homoj nur ploras, kiam ili ion perdas. Oni ne kutimas plori gajnante.... Sed mi perdis nek filon nek filinon : mi perdis ion pli gravan; mi perdis kunulon... gajigantan kunulon... Jen, vidu

1. Deklamita de la aŭtoro dum la dua prezentado de la dua kongreso en Genevo.

ĝin kuŝantan sur tero... mian malfeliĉan, mian ne anstataŭeblan botelon! (*Li ĝemetas kun ĉagreno. — Paŭzo.*)

Pri kio mi parolis al vi?... Ha, bone, mi jam rememoras!... Mi volis paroli al vi pri historio, ĉu ne? Jes, ho, certe tio estas ridinda, ke historio ne diras, ĉu Noe premegis la vinberojn per la piedoj aŭ per la manoj!... Kompreneble, bezonas esti ebria por ne bone vidi, ke li premegis ilin per la manoj tiel,... (*Li faras la geston premegi vinberon lasante fali la sukon en lian buŝon.*) ĉar ne estis en tiu tempo boteloj, en kiujn la piedoj estus enireblaj!!

(*Senkonfide.*) Ĉu estas vere, ke mi parolis al vi pri tio? (*Kvazaŭ infano.*) Ne... ne... vi erarigas min!

(*Meditante.*) Estas vere tro malgaja tio, kio okazis al mi!... Jen... mia edzino ĉiam al mi diris: « Vi malbone agas drinkante ĉiutage tri botelojn da vino en la drinkejo! »... Ho, mia edzino estas admonemulino!... (*Ridete.*) Feliĉe ŝi estas muta... (*Serioziĝante.*) sed anstataŭe, ŝi posedas tute ne poŝan vortaron. (*Li geste montras, ke lia edzino parolas per ekbatoj.*)... Pensante pri la argumentoj de mia edzino, mi min diris: « Eble, ŝi estas prava, kaj vi malbone agas drinkante ĉiutage tri botelojn da vino en la drinkejo. »... Do, kion mi faris por ŝin kontentigi?... Mi nur drinkis du botelojn en la drinkejo, kaj ĉi tiun mi alportis por ĝin drinki ĉe mia loĝejo.... Mi intencis alporti!! (*Kolera.*) Jen kio okazas, kiam oni plenumas la virinajn konsilojn!... Knabo pasis; min ektuŝegis; botelo glitis... paff!!... Vino forfluis!! Se mi ne ploras, estas nur ĉar viro ne devas plori.... (*Plorante.*) Alie, mi plorus kvazaŭ infano. (*Terure.*) Rigardu ĝin, mi petas, kaj diru ĉu tio ne igas plori! Ŝajnas vundito! Rigardu la sangon ĉirkaŭ ĝi?... Ho malfeliĉa botelo, mia amiko, mia estimata!! (*Li ploras ree. Poste, iom post iom, zorge li sekigas siajn okulojn per ĵurnala folio, kiun li eltiras el poŝo falditan kvazaŭ naztuko; zorge ĝin remetis en poŝon, kaj desegnas rideton sur siaj lipoj: la rideto kreskadis, malrapide iĝante rido kaŝita. Fine, li laŭte ridas subtenante sian ventron.*)

-Feliĉe, mi estas gaja homo!... Mia patrino jam tion al mi diris, kiam mi estis infano : « Mia filo, vi fine havos gravan etalon, ĉar la mondo apartenas al ridemuloj. »... Kaj ŝi ne multe eraris, la bona virino.... Kiel vi povas vidi, mia... stato, ne povas estis pli grava!... Sed mi estas tro modesta por ĝin valorigi!... Vi bone vidas, ke mia modesteco tute permesas, ke mi parolu kun vi ne postulante, ke oni vin prezentu al mi!... Oh! mia familio ĉiam rimarkiĝis pro sia modesteco. Jen ekzemple : Mia patrino, kiu havis ĉiam strangajn maniojn volis min naski *je* ponto. Kompreneble ŝi povis tion fari *sur* la ponto!... Nu! ne! ŝi faris *sub* la ponto, kaŝite!... Ĉiam la modesteco!... Estas homoj, kiuj eĉ por oscedi sonorigas la sonorilegojn kaj ĝin avizas per la ĵurnaloj... Mia patrino ne estis tia, kaj por min naski ŝi nenion diris al iu... eĉ al la najbaroj... dela apuda ponto!...

(*Li gestas; lia rigardo falas sur la botelon. — Malgajigante.*)

Ho mia malfeliĉulo, kia malfeliĉo estas la via!... Kiel zorge mi portis vin inter miaj brakoj!... Via sango verŝita malaperis suĉita de la tero!... Ho! Nenion plu vi vidos el la vivo!... Vi ne plu vidos la sunajn malleviĝojn, iafoje ruĝajn kiel infanajn vangojn; nek la ĉielojn bluajn kiel nordvirinajn okulojn; nek la tagojn nebulajn kiel pensojn de malgajaj ebruloj!...

Ho, tio disŝiras mian koron! Ho mia kunulo, antaŭ momento vivplena, kaj korbalanta pro via ruĝa sango... tiel ruĝa, kiel... la fervojaj aŝiŝoj... kaj nun pecigita kaj defluinta!... Ho mia infano!...

(*Senkonsole... kunrulas cigaredon, sed ĝin li ne brutigas.*)

(*Ŝanĝo.*) Ŝajnas al mi, ke estas malfrue... kion vi volas? tio devis okazi!... Mi ĝin bedaŭras, tamen mi ne povas ĉi tie restadi mian tutan vivon!... Adiaŭ... al vi!... Se vi bezonas ion de mi... (*Serĉinte en siajn poŝojn.*)... Pardonu; mi forgesis la vizitkartojn... Notu la adreson : (*Diktante.*) « Bulvardo Voltero, tria benko, dekstre.... »

Kompreneble, sube... : mia familio ĉiam sin rimarkigis per sia modesteco.

(Li restas momenton rigardante la publikon, poste sekigas du larmojn, kaj fine eliras malgaje, funebre, raike kantante :

Bela botelo aŭdu...

Lia kanto mallatentiĝas iom post iom malproksimen.)



PIPAMANTO



Fot. Ch. Vérae.

«... ĝi kostas al mi nur dudek centimoj... »



LA PIPAMANTO¹

Bela buduareto. Oni aŭdas kelkajn akordojn de valso. Li eniras frake kaj dande vestita, granda blanka floro ĉe l'butontruo. Enironte li zorge rigardas internen kaj eksteren.

— Neniu!... (*Enirante.*) Dio! Fine mi trovis senhoman angulon!... (*Observante la ĉambron.*) Ŝajnas ĉambreto laŭga por la virinoj de la hejmo.... Kia bonodoro!... Ĉi tie mi kredas, neniu vidos min.... Tial ke oni dancas nun, oni ne rimarkos mian forestadon.... (*Lia demetas sian monoklon kaj ĝin frotas per naztuko.*)

(*Frotante la kristalon kaj rigardante per duonfermitaj okuloj, al la publiko.*) Se mi pli prokrastus dum kvarono da horo mian eliradon el la salonoj, mi ekmortus!... Estas jam la dua matene, kaj de la deka nokte mi ne povas fumi!... (*Observante, ke sinjoro faras al li gestojn, li remetas sian monoklon, kaj rigardante lin.*) Ne, dankon, dankon; oni superŝulis min per cigaredoj.... Lia Princa Moŝto nenion alian faris dum la tuta vespero ol proponi al mi cigaredojn, delikatajn cigaredojn kun ora beko kaj... eĉ arĝentaj literoj.... (*Malestime*) Fvu!... Kiu povas kuraĝi uzi pipon en tia eleganta domo; permesite estas nur fumi cigaredojn. (*Al la sinjoro.*) Pardonu min, mi vin dankas.... (*Al la alia flanko.*) Proponi cigaredojn al viro, kiu scias, kio estas fumadi, kaj kiu deziregas fumi,

1. Monologo deklamita dum la dua teatra prezentado de la dua Universala kongreso de Esperanto en Ĝenevo.

estas kvazaŭ proponi karamelojn al tiu, kiu malsategas! (*Al la sinjoro.*) Dankon, sinjoro!... Jen, kion mi kunportas. (*Li eltiras longan terpipon el sia poŝo.*) Ĉu vi vidas tion? (*Legante sur la pipo.*) « 24^a, serio I »... Ĉu ne vere ŝajnas pipo? Tamen ĝi ne estas pipo, estas paradizo!!

(*Li iras ĝis la pordo, rigardas eksteren kaj revenas.*)

(*Kun mistero.*) Kiam tabako brulas ĉi tie, kiam fumante mi elirigas ĉielen ringiĝantan fumon, la anĝeloj kaj eĉ la ĉefanĝeloj malsupreniras de la ĉielo kaj rondedancas ĉirkaŭ la fajrujo... kaj eĉ mi kuraĝas diri, ke Sankta Petro forlasas la pordistejon kaj flankigante iujn nubojn aperigas la kapon por flari!

(*Li rigardas karese la pipon; ĝin zorgas, ĝin frotas...*)

Bone nigrigita, he? Ĉu ne?... Ĝi kostas al mi nur dudek centimojn; nu, se vi proponus al mi dudek frankojn, mi ĝin ne donus!... Kion vi volas? Multe mi ĝin amas!... Fumi; fumi per pipo, jen mia sola malvirto. Ĉu tio estas grava malvirto?... Mi estas pacema viro. Prenu miajn manĝaĵojn; forprenu miajn trinkaĵojn... nenion mi diros.... Eĉ se vi forportus miajn ŝuldojn aŭ mian bopatrinon, mi tute silentus... sed ne tuŝu miajn pipojn! Ho! se vi tion farus, mi ne scias, kio povus okazi!! (*Paŭzo.*)

Kaj tamen, jen la nedankemo de la objektoj! Nenio faris al mi tiom da malbono, ol miaj pipoj malgraŭ la amo, kiun mi havas por ili!

Mi jam tute forgesis la punmonojn de mi pagitajn pro fumado en vagonoj, en teatroj, en koncertejoj, kaj tiel plu, tiel multenombraj ili estas!... En muzeoj kaj bibliotekoj mi ne pagis, nur tial, ke mi ne kutimas iri en tiujn lokojn, alimaniere, certe ankaŭ tie mi estus pagiĝta.

(*Ridante.*) Unu fojon.... (*Serioze.*) Mi ridas nun, ĉar la afero estas pasinta!... (*Ridetante.*) Unu fojon, mi veturis en vagona fako. Kontraŭ mi, sidis maljuna fraŭlino kun stranga ĉapelo, kies randaĵo subtenis grandegan birdon, mordelitan de akaroj,.. ĉu kolombo,

ĉu hirundo... eble tute fantazia birdo naskita el laborejo. Ĉar mi legis kaj tute ne memoris plu pri mia kunvojaĝantino — kiu tamen pro ŝia malbeleco estis memorinda, — mi elprenis pipon el mia poŝo, — la 35^{an}, serio O, mi bone memoras, — mi ĝin ŝargas, ekbruligas, kaj... mi ne havis tempon sufiĉan por eltiri du suĉaĵojn... Fraŭlino mia kunveturantino prenas mian pipon, kaj rigardante min furioze, ĝin forjetas tra la fenestro ne dirante eĉ unu vorton, kaj poste ŝi reeksidas kvazaŭ nenio estus okazinta!... Gesinjoroj!! Mi paliĝis, kaj tute ekster mi, malgraŭ mia bon-edukiteco, obeante la unuan impulson, mi prenas la ĉapelon de l'fraŭlino, kaj ĝin, kolombon aŭ ion ajn, vualon, pinglon, florojn, ... ĉion, miavice ankaŭ mi forjetas tra l' fenestro post la pipo!... Ha! terure, gesinjoroj! Post la vualo, la kolombo, la ĉapelo, kaj ceteraj, iris ankaŭ... la peruko de l' fraŭlino!... Ho, ŝia kapo, ne estis plu kapo, ĝi estis melono kun krieganta truo!... Kompreneble, preskaŭ okazis, ke ankaŭ ni ambaŭ sekvu la forĵetitajn objektojn.... Poste mi devis konatiĝi kun la juĝistoj kaj tiom pagi la kolombon kvazaŭ ĝi estus viva kaj la hararon kvazaŭ ĝi estus natura!!

Kaj tio, kio okazis al mi je mia unua edziĝo?... Bonvolu diri al mi, kion vi estus farinta en mia loko.

Jen okazas la ceremonio, jen la festeno, jen balo, jen gratuloj, jen salutoj, jen adiaŭoj.... Unu tutan tagon ne povante fumi!!! (*Dolĉe.*) Kiam mia edzino kaj mi restis *fine solaj* en nia ĉambro, mi eksidis sur sofona... kaj fumis tri pipojn unu post la alia sen-intermanke!!

Mi deturnas mian kapon, kaj jen en angulo ŝi ploranta kaj ĝemetanta: « Vi ne amas min, vi ne amas min; vi pli amas vian pipon ol vian edzinon! » (*Gesto.*)... La sekvantan tagon, sceno eĉ la gepatroj. (*Per grava voĉo.*) « Pli ol mian filinon, vi amas viajn malbonodorajn pipojn! » (*Inde.*) « Sinjoro, miaj pipoj estas puregaj! ».... Kompreneble, de tiu tago, la familiaj interrilatoj fariĝis malvarmaj. (*Kun rezignacio.*) Je la finiĝo de l'jaro, eksedziĝo, kaj jen mi ses

edzino... kaj sen la cent mil frankoj de la doto!... (*Paŭzo.*)

Ha, ni fumu! (*Ŝarginte kaj montrante la pipon.*) Ĉu vi vidas ĝin? Bone! nu, ĝis la sama dato de la venonta jaro, vi ĝin ne revidos. Ĉar mi havas 365 pipojn, unu por ĉiu tago de la jaro. (*Kvazaŭ respondante ian rimarkon*) He?... Ho! jes, specialan ankaŭ mi havas por la lasta tago de Februaro en la superjaroj.... Ĉiu pipo estas numerita kaj ordigita de mia servisto en serioj. La pipoj de la festoj estas grandaj, tiuj de l'somero longaj... por ke la fajro staru malproksime de la buŝo, tiuj de l'printempo flore ĉizitaj.... Krom la ĉiutagaj pipoj, mi havas tiujn, kiujn mi nomas la *ĉiampretaj*, nome : nargileoj kaj naciaj pipoj, kiujn mi povas uzi laŭ deziro aŭ laŭ okazo....

Ĉar... vidu, eĉ la tabako estas ĉe mi objekto atentinda. Ĉu en Turkujo estas buĉado? — « Servisto! bruligu Armenian paperon, kaj donu al mi nargileon kaj turkan tabakon! » Ĉu io okazas en Rusujo? — « Rusan tabakon! » Ĉu sinjoro Roosevelt edzinigas sian filinon aŭ verkas novan verkaĵon? Mi ne legas ĉi tiun, sed tamen mi fumas tiam *Virginia tobacco!*... Ĉu la angla Reĝo... elpensas novan elegantan ĉapelon? — « *I am always smoking Cavendish, Cavy Cut, Pionner, Mixture, Three Castles and others!* » Ĉu la germana Imperiestro enmuzikigas... la konferencon de Alĝesiras? Ha! tiam : — « Glasegon da biero, kaj Afrikan tabakon en porcelana pipo » Ĉu sinjoro Fallières ricevas la viziton de lia grava Moŝto Sisovath? — « *Une pipe Gambier et du caporal!* » Italian tabakon, se italoj boras tunelon. Norvegan tabakon, se Ibseno mortas. Danan, se oni ludas en teatro Hamleton... kaj tiel plu....

Nur en du okazoj mi ne povas daŭrigi mian kutimon; unue, kiam io okazas en Ĥinujo, ĉar mi ne fumas opion, kaj due, kiam Sudamerikanoj interbatalas, ĉar... mi devus fumadi la Amerikan tabakon dum la tuta jaro!... (*Paŭzeto.*)

(*Li eltiras kesteton da alumetoj el sia poŝo.*)

Certe mi parfumos la ĉambron, sed, se iu venas kaj rimarkas

tiön, mi esperas, ke vi ne denuncos min; ĉu ne?... Ĉi tie, vere, mi ne estos devigata pagi punmonon, sed....

Pipo falas kaj rompiĝas! Li, hontanta, ne dirante ion, laŭvice rigardas la pipon pecigitan kaj la publikon. Poste, malrapide, malgaje, serĉinte en siaj vestoj kaj nenion trovinte, li iras al la pordo kun la manoj en la pantolonaj poŝoj, kun la kapo enprofundigita inter la ŝultroj kaj aljetante al publiko malamegan rigardon tra sia monoklo.


Subite, aŭdinte iun ridon, li haltas, sin returnas al la publiko, kaj nerve diras :

Mi ne komprenas kiel oni povas ridi vidante tian katastrofon!...
(*Li intencas ion diri, sed ekkrias.*) Mi preĉeras eliri! (*Kaj li eliras.*)





JONGLISTO



Fot. Ch. Věraz.

«... lia digestado fariĝis malbona... »



JONGLISTO

Matriĉa ĉambro, malmultaj difektitaj mebloj; pordo dekstre komunikante kun la ceteraj ĉambroj de l' apartamento; pordo maldekstre komunikante kun la ŝtuparo. — Oni aŭdas teruran bruon de porcelanaĵoj kaj vitraĵoj rompiĝantaj. Post momento, aperas malrapide, viro gratante sian kapon kaj rigardante flanke la ĉambro de kie li venas.

— Ĉu vere oni aŭdis?... Ĉu jes?... Dio, Dio, kiel malfeliĉa mi estas! Denove la mastro de la domo venigos al mi la pordiston, kaj tiun ĉi fojon li forpelos min el mia apartamento. Li jam minacis min antaŭhieraŭ, dirante, ke, se li reaŭdos tiun aŭ similan bruon, li elloĝigos min! Kaj, kion ni farus!?!... Ne; diru vere al mi, ĉu oni tro aŭdis! Multe? Ha!

(Al iu post paŭzeto.) Ne sinjoro, mi ne batalis kun mia edzino; mi jam ne povas batali kun ŝi, ĉar ŝi estas jam de du semajnoj ĉe siaj gepatroj. Ĉu vi scias? Ni ambaŭ estas ekszedziĝontaj! Jes, ŝi volis, ŝi deziris, ŝi deziregis; kaj, pro kio? Pro la sama kialo, ke vi aŭdis ĵus tian nervigan bruon. Pro tio, ke mi estas jonglisto; aŭ pli ĝuste; mi ne estas ankoraŭ jonglisto, sed mi estos, mi esperas; mi nun nur lernas la jongladon.

(Post paŭzeto.) Ha, se homo povus bone elekti sian profesion; ha, se oni scius, antaŭ kiam oni komencas lerni, la malfacilaĵojn de ĉia metio!... Ĉar, kiam oni jam komencis, oni ne povas lasi ilin, inter aliaj kaŭzoj, pro la elspezoj faritaj... Ĉu vi povus kalkuli la sumon elspezitan de mi por teleroj, pladoj, pladoj kaj ovoĵ? Se almenaŭ mi lernus la medicinon! La malsanuloj, kiujn oni krakigas, ne doloras vin! Sed la teleroj pecigitaj. Dio! faras impreson, kvazaŭ oni forprenus de vi ian karan internaĵon vian!

Ha, mondo, mondo, ĵongla mondo! Kial mi intencis unufoje fariĝi ĵonglisto?! — Ha, la vivo ridetis al mi ĝis la momento, kiam mi ĵetis enaeren la unuan teleron, kaj kiam ĝi — la telero kompreneble — kaj la vivo eĉ, se vi volas — falis sur mian kapon! (*Montras la vertron de sia kapo al la publiko.*) Jen la postsigno! Ĉu vi ne vidas? (*Eble iu diras : ne! ĉar li aldonas.*) Tamen, mi sentis!

(*Post paŭzo kaj reve ridetante.*) La teatroj de diversajoj, ĉiam altiris mian animon. Cetere, mia emo por tiaj teatroj estas familia heredo. Mia patro gajnis sian vivon kaj ankaŭ edukis min laborante en ili. (*Kun fierco.*) Mia patro estis rimarkinda ventroparolisto. Ĉiajn voĉojn, kantojn kaj kriojn li imitis mirinde. (*Reve.*) Kiajn amuzajn dialogojn li faris! (*Tute ravite.*) Precipe la blekojn de la porko, li imitis tiel bone, ke ĉiuj, kiuj lin aŭdis, kredis, ke la krioj venas de tre malproksime kaj neniam povis diveni, ke la porko estas li mem!... Bedaŭrinde, post kelkaj jaroj, lia digestado fariĝis malbona, kaj lia stomaka voĉo malaperis! La artisto ne povis postvivi sian voĉon, kaj li mem ankaŭ pereis! (*Sekigas du larmojn per la dorso de la mano. Paŭzo.*)

(*Kun rideto.*) Tiam estis mia patrino, kiu surpaŝis la scenejojn. Kvankam el *Menilmontant*¹ ŝi faris rimarkindan virinon ĥinan. Kiajn belajn vestaĵojn ŝi portadis! Kaj kun kia gracio ŝi flugigis papiliojn el cigareda papero per palma ventumilo! — En tiu tempo oni jam iomete parolis pri stranga lingvo, Esperanto, mi kredas, sed preskaŭ neniu konis ĝin; nu, do, kelkaj vortoj esperantaj de ŝi lernitaj kaj de ŝi dirataj ĉiutage, kiam ŝi eniris sur la scenejon, kredis bonege al la publiko ŝian ĥinan devenon. Ha, kia impresio sur la publikon, kiam ŝi ekkriadis : « *Tiuj ĉiuj, kiuj, konfuzo, konfuzo, konfuzo!!* »... Post tio, por montri des pli bone la ĥinajn kutimojn, ŝi manĝadis senintermanke dekduon da teleroj da rizo... La publiko ne estas vere postulema!... Kaj tio estis bona afero; ŝi

1. Popola kvartalo Pariza.

ŝperis la hejmajn manĝojn... Sed malfeliĉe, pro la trouzo de rizo, ankaŭ la patrino digestado malboniĝis; ŝi ne povis plu iri sur la scenejojn, kaj ŝi mortis pro rizplenego... kaj pro bedaŭro de la hinaĵoj. (*Larmetoj.*)

Malfeliĉe, nek de la patro nek de la patrino, mi heredis la stomakojn. De mia patro ne, ĉar mi ne povas paroli per la ventro, kaj ankaŭ ne de mia patrino, ĉar ŝia delikata stomako malsaniĝis pro trouzo de rizo, dum la mia estas tiel forta, ke ĝi eĉ ne rimarkas la absolutan neuzadon de manĝo!... Tia fortikeco de mia stomako servis al mi dum kelkaj semajnoj por gajni iom da mono farante « *la homo, kiu ne bezonas manĝi* ». Sed mi forlasis tuj la metion; (*inde*) ĝi estas kontraŭ homa indeco!... Ke mi ne manĝu, kiam mi ne havas monon, estas tute komprenebla kaj logika afero, sed, ke oni donu al mi monon, por ke mi ne manĝu, t. e., ke mi ne manĝu por povi manĝi, kaj, ke mi ne povu manĝi, kion mi gajnis laborante por manĝi, ha fi! tion mi ne komprenis, kaj mi haltigis gravan eksperimenton faritan pri mi en Scienca Akademio, per englutado de kvardek centimojn da frititaj terpomoj!

(*Post paŭzo.*) Mi praktikis multajn metiojn post tiu lasta; mi edziĝis — eĉ en tiu ĵonglo mi ne prosperis! — Kaj jen oni konsilis min, ke mi fariĝu ĵonglisto! Eble estis la diablo mem, kiu konsilis! De tiu tempo la plej grandaj malagrablajoj okazas al mi! Kaj ĉio, tial ke mi ne estas lerta, tute absolute ne lerta! Ha, ĉiu afero, kiun mi ĵetas en la aeron, estas por mi kvazaŭ birdo; ĝi ne revenas plu al mia mano!... Vidu ekzemple; vi bone scias, ke, se oni forĵetas karton donante al ĝi ian reveneman impulson, la karto post forflugado revenas al la ĵetinto. Tio estas simpla afero, ĉu ne? Do, vidu. (*Li eltiras el sia poŝo karton, kaj post longa preparado de siaj fingroj sur ĝi, li ĝin ĵetas tiel mallerte, ke la karto falas sur la publikon; sama afero kun dua, tria kaj ceteraj karto.*) Eĉ ne unu revenis!... Iu konsilis min, ke mi faru la ĵonglon per plipeza afero, kiu ne tiom influigas de la aerfluo, kiel la karto, kaj al kiu oni povas doni pli

fortan reveneman impulson; oni diris al mi, ke mi ne timu, ke mi faru la jonglon per... telero ekzemple!

(*Vidante la telerojn, kiuj estas sur la tablo.*) Jen; mi montros al vi; vi vidos kiel, flugintaj super vi, la teleroj revenos al mi: (*Li prenas unu teleron kaj faras la geston, kvazaŭ li ĵetos ĝin per sia tuta forto.*) (*Rimarkinte, ke iu saĝa sinjoro sin pretiĝas por foriri, kaj ke la saĝeco eble fariĝos ĝenerala, li haltigas la geston kaj diras, sin turnante al la sinjoro.*) Ne foriru sinjoro, mi ne faros, restu! Jes, mi komprenas; vi ne venis ĉi tie por ricevi teleron sur la kapon! Ne timu, restu! (*Lasas la teleron sur la tablon.*)

(*Post paŭzo.*) Kaj la pordisto alfrapos, ha jes, li alfrapos laŭ ordono de la mastro de la domo, kaj li elloĝigos min. Oni aŭdis la bruon kaj..., jen (*tre konfidencie*) mi ŝuldas al la proprajulo tri monatojn de loĝado kies pagon li konsentis prokrasti, tial ke mi certigis lin pri mia baldaŭa dungiĝo kiel jonglisto en teatro de diversaĵoj. Ĉu vi komprenas? Do ĉiufoje, kiam li scias, ke mi faris rompadojn, li vidas miajn estontajn dungon kaj pagon de la ŝuldo kiel tute ne solveblan problemon. (*Paŭzeto.*)

La sola afero, kiu malgajigas min profunde, estas la kolero de mia edzino.... Jes, mi komprenas; ne estas ĝoje vivi inter flugantaj hejmaĵoj, kaj dormi kun edzo, kiu eĉ nokte sonĝante jonglas. — La lastan fojon, tio, kio decidigis ŝin forlasi la hejmon kaj eksedziniĝi, estas, ke mi difektis ŝian nazon per ŝuo, kiam ŝi dormis!... Sed mi faris tion senkonscie; mi ne estas kulpa!... Tamen ŝi estas prava; oni ne edziniĝas por ricevi ŝuon sur nazon; mi komprenas! sed, kion vi volas?

(*Restas momenton pripensante.*)

Tamen, tamen, malgraŭ mia malbona ŝanco mi havas lertecon por fari du jonglojn. La unua eble ne interesos al vi ĉar konsintas el saltigi la apetiton de semajno al semajno sen ke ĝi ektuŝetu eĉ kun pana molaĵeto! Sed la dua... ha, jen, vi estas simpatiaj al mi kaj mi faros por ke vi vidu. Ha, mi ĝin faras tiel bone, ke eĉ mi mem miras!

Jen. (*Li prenas du telerojn el la tablo.*) Mi ĵetos unuan teleron en la aeron, kaj post ĝi mi ĵetos duan teleron; tiun ĉi. Bone. La dua, tiu ĉi, iros renkonti la unuan, ĉiam en la aero kaj ĝin pecigos. Tre bone. Ĉu vi komprenas? Nu, kaj nun venas la malfacilaĵo: la pecoj de la unua telero pecigita kunvenos ĉiuj sur la duan teleron nepecigitan, kaj la tuton mi ricevos en la manon kvazaŭ enio estus okazinta. Komprenita? Nu, do, jen! (*Post longa preparado; al la publiko.*) Poste, eĉ se vi volas ian pecon de la unua telero, mi donacos al vi kiel memoraĵon. Jen! (*La du teleroj forflugas enaeren unu post la alia. En tiu momento oni alfrapas la pardonon. Li sin turnas kaj la teleroj falas teren kun granda bruego.*)


Satana alfrapo! Jen la pordisto! Ha, prave mi timis! Mi petas, mi petegas; diru, ke ne, ke oni nenion aŭdis, ke li eraras, ke mi fariĝos bona ĵonglisto!... Dio, Dio! (*Rikoltante la pecojn de la teleroj kaj ilin kaŝante.*) Kaj tio estis unu el la du solaj ĵongloj, kiujn mi bone faris. Nun mi nur povos fari la alian! (*Oni realfrapas.*)

Tamen, tamen... ne! Li forbalau min. Jes, mi meritas! Mi ja scias, kion mi faros, kion mi devas fari!... Jes, ne plu ĵonglado! (*Realfrapo.*) Tute ne! Mi iros renkonti mian edzinon, petos de ŝi pardonon kaj serĉos oficon, kiel... kelnero ekzemple. Jes, kelnero; jen bona solvo! Mi esperas, ke almenaŭ el miaj manoj mem ne falos la teleroj! (*Al iu.*) Ĉu vi dungas min? Jam de morgaŭ? Ĝentila sinjoro!! (*Realfrapado.*) (*Al pordo.*) Tuj, tuj, malbenita viro, mi malfermos tuj. (*Al sinjoro dunginta.*) Ha, vi vidos, kiel gracie mi alportos al vi la aferojn.... Ne, ne, tenante ilin forte per la du manoj, jes, ne timu. (*Realfrapado.*) Diable! (*Al ĉiuj.*) Pardonu gesinjoroj! (*Al la dunginto.*) Dankon! (*Al ĉiuj.*) Pardonu, mi iras malfermi al tiu sovaĝa pordisto! (*Iras al pordo.*)





FOTOGRAFISTO



Fot. Ch. Vérae.

«... ke ĝi striku iom!!... »



FOTOGRAFISTO

Komparo. — Aperas viro kun granda fotografa aparato pendanta sur la dorso, stativo en ingo en la dekstra mano kaj malgranda rapidira aparato en la maldekstra. Li enpaŝas rapide la scenejon kiel viro tre okupata, sed vidante la publikon, li haltas mirigita.

Ha ha! Kiom da homoj! Jen fine mi sukcesis hodiaŭ trovi interesan aferon por fotografi!... Ne moviĝu, mi petas (*Sin pretigas por fotografi per la mana aparato.*) (*Al si mem.*) Sed, kion faras ĉiuj ĉi homoj kunvenintaj ĉi tie?! (*Li skuas la maŝineton, ĝin frapas, turnas renversas, svingas kaj premas.*) (*Al iu.*) Kial vi ridetas!? Ĉu vi ankaŭ estas el tiuj, kiuj opinias, ke la fotografarto postulas manojn de anĝelo? Do, sciui, ke ĝi postulas, kiel ĉio en la mondo, energion, fortecon, virecon, kaj necedemon! (*Li skuas la maŝineton, ĝin frapas, turnas, renversas, svingas kaj premas.*) La viroj devas ĉiam kaj ĉie kaj ĉiel kaj ĉial, montri sian superecon, ne malpli por la fotografarto ol por ĉia ajn afero! (*Li skuas la maŝineton, ĝin frapas, turnas, renversas, k. t. p. Ellirinte tro energie ian ŝraŭbon, ia peco de la maŝino restas pendanta el lia mano.*) Ho, tio ne estas grava! (*Ĵetante la objekton.*) Por nenio ĝi taŭgas; mi, eĉ neniam komprenis, kial oni aldonas ĝin al la maŝinoj; eble por plikomplikiĝi la fotografilojn kaj igi ilin pli multe kostaj! (*Li skuas la maŝineton, ĝin frapas, turn... k. t. p.*) Diablo! ĝi ne volas funkcii! (*Al la maŝineto.*) Vi vidis ja, se mi koleros! (*Al iu.*) Tiu sinjoro de la dekstra flanko... vi!... ne vi!... jes, vi! bonvolu ekkapti sur viaj

lipoj rideton pli dolĉan; vi tro malgaje ridas! Iom pli! bone, sufiĉe nun!... ne tiom!... bone, bonege! (*Li skuas la maŝineton, ĝin...*, *k. t. p.*) (*Al la fotografilo.*) Vi funkcios, vi funkcios, vi funkcios, aŭ mi montros al vi mian energian volfortecon! (*Oni aŭdas teruran bruon de rompitaĵoj vitroj, el la aparato.*) (*Al la maŝineto.*) Ha? Ĉu vi vidas, kio okazas, kiam oni ne volas obei la voĉon de la mastro? Vi rompiĝis, jen!... Eble vi pensis malhelpi min rompiĝante, ĉu ne? Do, des pli malbone por vi mem! ĉar mi tamen fotografos la gesinjorojn.... (*Al la publiko.*) Homo antaŭpreta tiom valoras, kiom du; pro tio mi ĉiam kunportas kun mi rezervan fotografilon (*Eltiras el laingo la grandan maŝinon. Al si mem.*) Sed, kion, diable! faras tiuj kunsidantaj homoj. (*Li skuas la ŝultrojn.*) (*Al la publiko, pretigante la aparaton, la stativon, k. t. p.*) Mi estas artista kunlaboranto de la ĉiusemajna ilustrita revuo « La Striko », kiu devis aperi jam antaŭ du monatoj, sed kies apero estis malhelpita de striko farita de... la strikistoj. Komprenoble, ĉar mankis strikantoj, oni nenion povis raporti koncernantan la revuon. Sed tuj strikis la kompostistoj, kaj tiam, vere estis afero raportinda, sed ne estis iu, kiu volas labori en la presejoj, kaj la rezultato estis la sama.... Ha! la tempoj ŝanĝiĝas! Antaŭe, la metiistoj estis laboristoj kaj kelkafoje strikantoj; nun oni estas strikisto kaj de tempo al tempo oni laboras. Mi estas ĝoja pro tio, ke miaj filoj naskiĝis en tiu ĉi ripoziga epoko, sed tamen mi bedaŭras, ke tiun ĉi fojon ĝi malhelpis la aperon de la unua numero de nia revuo kaj konsekvence la montron de mia fotografarta lerteco.... Sed ĉio aranĝiĝos. La direktoro petis helpon de l' Ministro de la Tutjara-Ripozo kaj la venontan monaton vi povos aĉeti la gazeton... se la vendistoj decidus iom labori por distriĝi.... Vi vidos, kiel bela aperos la fotografajo, kiun mi tuj faros.... Sed, vi estos tre ĝentilaj sciigante iomete al mi, kion vi faras ĉi tie. La publiko estas scivolema kaj por ĝin kontentigi, kutime oni faras raportojn aldonante al la fotografajoj kelkajn vortojn pli aŭ malpli rilatajn.... Ha, ha!

Vi ankaŭ estas strikistoj? Bonege; des pli bonege! Vi estas strikistoj de la enuo?! Mirinde!... Ĉiutage oni ekscias novaĵojn! Kaj, vi venas ĉi tien por interkonsentiĝi pri ia demando!... Mirindege! La direktoro de la revuo pligrandigos miajn honorariojn, kiam mi alportos fotografiaĵon de tiu ĉi grava kaj novega afero! (*Al in.*) Sinjorino, vi estus tre ĝentila, se vi, formetus vian ĉapelon; oni ne vidus la sinjoron, kiu sidas post vi kaj kies vizaĝo estas ĝuste tre interesa. Mi dankas! (*La maŝino staras tute pretu. Li prenas nigran tukon, jetas ĝin sur sian kapon, kaj rigardas al la publiko de post la maŝino kaj tra ĝi. Fovante gestojn per la libera mano.*) He! Tiu fraŭlino! ŝi klinu la kapon iom maldekstren! Bone!... Oni ripozigu iom tiun suĉulon! ĝi striku iom, almenaŭ dum unu momento! (*Formetante la tukon kaj prenante la kaŭĉukan piron, ŝin pretigas por fotografi.*) Ĉiuj kvietaj!... Uuu! du!... (*Bidetante.*) Almenaŭ tiun ĉi fojon, mi trafos! Nu! Nun ne estos eraro! Ha, ne estas facila la tasko de kunlaboranto de ilustrita revuo! Antaŭ du jaroj mi estis redaktoro de la revuo *La Gazeto de la Krimeo*. Mi okupis min pri la fotografia fako. Kiel vi komprenas estis tre malfacile scii, kie kaj kiam oni elfaros krimon, por iri tien fotografi la okazaĵon. Mi devis kontentiĝi fotografante, post la krimo, aŭ la mortigiton aŭ... la tranĉilon uzitan de la krimulo. En tiu tasko mi rompis tridek-tri maŝinojn : tiuj okazaĵoj postulas tiom da rapideco! Nur post unu monato, okazis terura hombuĉado; mi atingis fari fotografiaĵon, en kiu estis kunmiksita la mortigito, la krimulo, la juĝisto, la scivolema popolo, kaj la filo de la kuzo de l' patrino de ia amiko de l' pordisto de la mortigito. Mi metis numeron sub ĉiu persono en la kliŝaĵo, kaj sur apartan paperon mi skribis la nomojn respondajn. Sed en la presejo oni konfuzis ilin terure, kaj la numero de la juĝisto respondis je la nomo de la popolo! tiu de tiu lasta je tiu de la filo de la kuzo de... k. c., de la mortigito; la numero de la krimulo respondis je la nomo de la juĝisto... kaj oni forpelis min el la redakcio pro la ĉiufankaj plendoj. La sola,

kiu ne protestis, estas la mortigito, tre bedaŭrinda viro!... Cetere, se li vidus la belegan fotografaĵon, li dankus min. Li estis tiom bone kaptita, ke li ŝajnis kvazaŭ vivanta!

(*Preta ree.*) Nu! Unu!.. du!... (*Ridetante.*) Poste mi fariĝis artista redaktoro de revuo de sportoj. Mi devis fari iun dimanĉon, fotografaĵon de la fiŝkaptistoj de la Sejno. La raporto devis aperi du tagojn poste. Mi rapidis; mi lokis min post grupo de fiŝkaptistoj por ilin fotografi, mi pretiĝis, kaj jen unu el ili tute distre, ĵetonte la fadenon en la riveron, alkroĉas mian maŝinon per la fiŝhoko, kaj maŝino, tuko, stativo, ĉio, flugis en la akvon, je ĝenerala ridego! Kompreneble, la raporto ne povis esti farita, kaj oni ankaŭ forpelis min el la sporta revuo...; sed kio plej kolerigis min estis la fakto, ke tiu malsaĝa fiŝkaptisto estis tute senŝanca viro, kiu neniam ion fiŝkaptis; nu! mia maŝino estis la unua afero, kiun de du jaroj, li alkroĉis per sia fiŝhoko, la malspritulo!

(*Preta.*) Sed nun, mi esperas, nek okazos eraro, nek ankaŭ fiŝkaptisto sin intermiksos... kaj morgaŭ mi ricevos gratulegaron de mia direktoro pro raporto tiel interesa, kiel raporto pri kunveno de novaspecaj strikistoj....

Nu! Unu!.. du!... Tiuj de tiu ĉi flanko levu iom pli la kapon!... Unu! La sinjoro... tiu, jes, (*Li faras diversajn mienojn montrante al ĉiu la decan pozon*) tiel.... Vi... ne... iom pli deks... bone! (*Al iuj.*) Se vi parolos, nenion bonan ni faros! (*Al aliaj.*) Oni vidu per via mieno, ke vi ne volas plu enui.... Energiajn vizaĝojn!... Dekstren!... Maldekstren!... Unu!.. du!... Tiu mano... kaŝu ĝin..., ne, tiel, jes... La sinjoro.... Energion! Ridetu! Kvietecon! Unu! du!... (*Li tiras tro, dum unu el siaj moviĝoj, la kaŭĉukan tubon. La maŝino ŝanceliĝas, falas, kaj... frakasiĝas.*)

Diablo, el la diablejo, el la satanujo! Mi estas vere malfeliĉa! (*Rikoltante la pecojn.*) Jen, jen, jen.... Ĉio malbonigita. (*Kiam li reprenas la aparaton mem, oni aŭdas bruon de frakasitaj vitroj*) Jen!...

Tamen, ne senkuraĝiĝu! Nu! estu paciencaj, kaj ni faros la fotografajon.

Mi ĵuras! Atendu nur la sufiĉan tempon, por ke mi iru hejmen kaj mi revenu tuj kun nova fotografilo. Ne moviĝu, mi petas; vi estas bonege tiel! Tuj, tuj mi reestos ĉi tie. Vi ne multe devos atendi. Mia domo ne estas malproksima de ĉi tie... je du horoj, du horoj kaj duono, nur. Tuj mi revenos... ĝis revido gesinjoroj... kaj eĉ estos pli bone; eble tiuj nubetoj estos malaperintaj.... Ha, vi vidos ja!.. ĝis baldaŭ... la tempo nur por iri kaj... reveni, kompreneble! Tio estos ne pli ol kvar horoj... (*Salutante kaj rapide forironta kun ĉiuj la aferoj malzorge metitaj sub la brakoj.*) Gesinjoroj!... Vi atendu, ĉu ne? La afero tion meritas! Gesinjoroj!...

(*Li foriras... kaj la publiko ankaŭ.*)






OKAZA ARTISTO



Fot. Ch. Vêrac.

«... bela brava juna dano... »



OKAZA ARTISTO

Strato. — Aperas viro kun mantelo sur la ŝultroj, granda pelta ĉapelo klinita super la okuloj, la manoj sur la koksoj kaj la rigardo priokupita. El sub la basko de la mantelo, oni ekvidas, kazaŭn glaron, bastonon.

Li antaŭeniras grave kaj malrapide. Alveninte plej eble proksime al la publiko, li restas momenton nenion dirante. Fine, sin adresante al sinjoro flanke sidanta, li demandas :

Ĉu vi bonvolas diri al mi, kioma horo estas?... La kvara?!
(Al si mem.) Ha! Dio! Mi devas ankoraŭ atendi unu tutan horon!

(Al la flanksidanta sinjoro.) Mi dankas, sinjoro.

(Al ĉiuj.) De tagmezo mi estas sur la strato; mi ne povis resti hejme.... Mi estis malkvieta, nerva.... Mi timis malfrui... kaj de la dua mi promenadas tra ĉi tiu kvartalo! Kial? Ha! gesinjoroj, post unu horo, mia sorto aperos antaŭ mi nigre aŭ rozkoloro desegnita.

(Post paŭzeto; montrante al la fundo.) Ĉu vi vidas tiun domon? Tie loĝas homo, kiu povos min levi ĝis la gloro aŭ min enprofundigi en abismojn! Li estas klera, sciencema artistamanto, kaj precipe influa, tre influa...!

Se li volos min helpi, mi atingos la gloron; se li ne volos min aŭskulti, mi estos, kiel mi diris, enprofundigita en la mallumojn....

Je la kvina, li akceptos min. Mi tion petis de li kaj li konsentis.

Ĉu vi pensas, ke li bonvolos plenumi mian peton? Ĉu vi kredas, ke li helpos, por ke mi fariĝu direktoro de la Teatro nomita :

« LA MUZOJ DEKLAMANTAJ »

... Jes, gesinjoroj, mi tre dezirus fariĝi direktoro de teatro....
(Al ŝi.) Ĉu mi estas aktoro? Tute ne.... Mi estas profesoro de Esper-

anto, sed ĉar la metio ĝis nun ne multe produktas, mi devas alie labori por gajni iom da mono kaj travivi. Tamen el ĉiu firmo, kie mi laboris, oni min forpelis tial, ke mi havas bedaŭrindan malsanon.... (*Al ĉiuj.*) Mi havas la malsanon de la dormemo. Ifoje mi dormas du aŭ tri tagojn senintermanke. Pro tio, oni konsilis min, ke mi fariĝu oficisto de la Ŝtato; sed tio ne plaĉas al mi.... Krom la emo al la dormado, mi havas la emon al la teatro, kaj multe observinte kaj studinte, mi alvenis al la konkludo, ke nenio estas pli facila ol direkti teatran bandon, ke mi havas, rilate al tio, grandan kapablecon, kaj ke tio alportos al mi multe da mono.

Jes, pro mia lerteco kaj artisteco, mi kredas, ke la influa sinjoro ĉi tie loĝanta helpos min, kaj malfermos por mi vojon profitan kaj....

(*Al iu.*) He? Kion; pri kio vi demandas?... Certe, kara sinjoro, tre certe.

Ĉiu teatraĵo estas facila por ludi.... Sufiĉas nur posedi, kiel mi, artistan temperamenton.... Kiajn vi diras?... Tiuj de Meterlink? Facilaj, facilegaj por ludi kaj lernigi al aktoroj. En tiuj teatraĵoj, la aktoroj devas nur sin montri revemaj, reve paroli, kaj ĉiam ripeti la samajn vortojn.

(*Post paŭzeto.*) Jen, ekzemple, sceneto inter patro kaj filino. (*Montrante la lokojn kaj imitante mistikan mienon.*) La patro sidas tie... revante, kaj la filino eniras... ankaŭ revante. Plej bone estus, se ŝi tenus iridon en la mano kaj havus la nazon flarantan inter la folietoj....

(*Ŝajniginte la eniron de la filino kaj imitante plej eble la malsamajn voĉojn de maljunulo kaj junulino; mistike.*)

— Kia varmo, patro!

— Certe, kia varmo, mia filino!

— Neniam la vetero estis tiel varma!

— Vi estas prava, neniam la vetero estis tiel varma!

— Oni ne scias, kiam estos aŭ ne varma la vetero!

— Jes, mia filino, oni ne scias, kiam est....

— Bone, bone! mia patro!

(*Klarigante per sia natura voĉo.*) Tiuj lastaj vortoj de la filino rekonsciigas la patron : (*Reprenante la mistikecon.*)

— Diru al mi, ĉu vi ĵus diris : Neniam la vetero estis tiel varma?!

— Jes, mi diris tion!

— Kial vi diris tion?

— Mi ne scias kial, mia patro!

— Ha, terure! Fermu, fermu kaj ŝlosu la pordon!

— Kial mi devas fermi kaj ŝlosi la pordon?

— Ĉar mi aŭdis bruon...! Ho! tiu varmo!

— Ĉu vi aŭdis bruon?

— Jes, mi aŭdis bruon!

— ... Eble... la pordistino...!

(*Tre konvinkite.*) Vi vidas, ke nenio estas pli simpla!

(*Kvazaŭ ĉi estus dirinte ion.*) Ne, ne; la teatraĵoj de la norvega Ibsen, ne estas pli komplikaj. (*Grave, kaj magistre.*) La aktoroj devas nur atenti pri tio : ke ĉiuj vortoj dirataj signifas alian aferon ol tiun esprimatan de ili. (*Indulge.*) Eble estus malfacile komprenigi al vi tion, kion oni nomas simboloj. Aŭdante scenon, vi pli bone vidos la facilecon de la ludado.

(*Malantaŭenirante.*) La sceno okazas inter patrino kaj filo. Ĉi tie, la patrino; la filo eniras fumante pipon. (*Trinte al la fundo kaj haltante.*) Kompreneble, tiu filo estas artisto, kaj kompreneble ankaŭ, li estas malsanema : tio estas pli drama.

(*Ŝajniĝinte la eniron de la filo pipfumanta, diras la jenon, imitante la du voĉojn.*)

— Bonan tagon, Panjo!

— Ho, lasu la pipon!

— Ĝi estas la pipo de mia patro, kaj per ĝi li igis min fumi, kiam mi estis infano!

— Ho, li tion faris?

— Jes, kaj sendube pro tio, mi deziras nun supreniri al la suproj de la montoj, kie estas la nebuloj....

— Ne, lasu tiajn ideojn!

— Ne, patrino, ne; ĉar mi deziras verki mian verkon! Mi deziras amuziĝi!

— Ha, bone! Jen bona ideo!

— Jes, ĉar mi havas mian idealon. Ĉiu homo havas idealon; do, donu al mi ĉampanon!

— Volonte, alvoku la servistinin.

— Kaj donu al mi ankaŭ la servistinin!

— Bone; sed unue lasu min ekkrii: Fantomoj, spiritoj, revenantaj spiritoj de lia patro!

— Ekkrii, ekkrii! sed mi volas ankaŭ la sunon, panjo; donu al mi la sunon... la sunon... la sunon...!

(*Tre konvinkite.*) Kiel vi vidas, nenio pli facila por ludi ol tiuj teatraĵoj. Tamen, kiel mi jam rimarkigis, vi devas kompreni, ke pipo, monto, idealo, suno,... ili estas nur simboloj.... Bone!

(*Al iu.*) La laŭnatura teatraludo?... (*Al ĉiuj, per deklamanta voĉo.*) Ho, gesinjoroj.... (*Al la sinjoro flanksidanta, per natura voĉo.*) Bonvolu antaŭe diri al mi kioma horo?... La kvara kaj kvarono?... Mi dankas; mi havas sufiĉan tempon.

(*Al ĉiuj ree, per deklamanta voĉo.*) Ho, gesinjoroj, simpla ankaŭ estas la laŭnatura teatraludo.... Unue la aktoroj devas kiel eble plej montri sian dorson al la publiko..., kaj tranĉi sian paroladon ĉu per purigado de nazo, ĉu per gratado, ĉu per tuso, ĉu per kraĉado. Vidu, imagu al vi, ke du riĉuloj interparoladas:

(*Dorse al la publiko li diras la jenan dialogon, tusante, sin gratante, k. t. p.*)

— Ĉu la negoco prosperas bone?

— Ne multe bone....

— Kaj, ĉu vi vidis la Grafon?

— Ho, jes. Mi vidis lin en la Klubo, kie mi vespermanĝis kun la Reĝo de la Petrolo.

(*Vizaĝe al la publiko.*) Kontraŭe, la klasika teatraludo devigas la aktorojn esti ĉiam bonmanieraj, kaj neniam turni la dorson al la publiko. Jen, ekzemple, sceneto inter du terlaboristoj :

(*Diras la jenon farante profundaĵn riverencojn.*)

— Ĉu vi rikoltis multe da terpomoj?

— Jes, kaj multe da brasikoj.

— Tio pravas, ke via tero estas bone sterkita. (*Salutas per la ĉapelo.*)

— Ho, la sterko estas tre bona por la kulturo de la tero.

— Vi estas prava. Nun mi revenas en la urbon per mia aŭtomobila plugilo, ĉu vi volas akcepti lokon en ĝi? Ne, ha, ha! vi havas ankoraŭ pecon da tero por plugi? Do, bonvolu transdoni mian respekton al sinjorino via edzino.

(*Al ŝi.*) Kioma horo...? Bone, bone... (*Al ŝiaj.*) Do, gesinjoroj, Ŝekspiro ne estas pli malfacila. Tamen, oni bezonas iom da helpe de l' publiko. Aplaudado, post longa deklamaĵo, ĉiam estas bona. Tion povas fari la aplaudistaro speciale dungita de l' direktoro de l' teatro. Rilate al la bando, por ke ĝi bone ludu la dramojn de Ŝekspiro, oni nur devas rekomendi al la aktoroj, ke ili faru melodraman mienon, iom kantu la frazojn, metu ofte la fingrojn en la harojn, kaj parolu per raŭka basa voĉo. Vidu :

(*Aranĝinte sian ĉapelon muskediste, kaj sian bastonon kvazaŭ glavon sub la mantelo, li deklamas.*)

« Ĉu esti aŭ ne esti, — tiel staras
Nun la demando. Al mi respondu,
Ho! Spirito de mia patro la Reĝo!
Ha, malfeliĉa... »

(*Al publiko.*) Pardonu... (*Al suftoro.*) Tombisto, donu do kranion, mi petas... mi dankas... (*Montrante ĉapelon ricevitajn de la suftoro.*) Tio estas senkarna kranio...

(*Reprenante tragedian voĉon, kaj sin adresante al ĉapelo.*) « Ha, malfeliĉa Jorik! Mi konis lin, Horacio; persono de senfine gaja humoro, plena de plej belaj spritaĵoj. Mil fojojn li portadis min sur la dorso, kaj nun kia terura vido! La koro al mi premiĝas. Tie ĉi pendis tiuj lipoj, kiujn tiel ofte mi mordis... kisadis... eee! (*Ĉiam al ĉapelo.*) Ho, vi bela... ».

(*Al publiko.*) Pardonu...

(*Redoninte la ĉapelon al sufloro, kaj ree per tragedia voĉo.*) « Ho, vi bela Ofelio, naĝanta kun viaj blondaj haroj sur la verdaĵ akvoj kovritaj de floroj...! Ho, io putras en Danujo, sed mi....

Bela, brava, juna Dano
Portas plumon sur ĉapelo
Kaj bastonon en la mano...! »

(*Al publiko.*) Bonvolu aplaŭdi, karaj gesinjoroj.... Aplauĉdu! Bone, dankon!

Vi vidas do, ke kun helpo de aplaŭdistoj, la aktoroj bone sukcesas per Ŝekspiro aŭ iu ajn tragediisto.

(*Al la flanksidanta sinjoro.*) ... Kioma horo...? La kvara kaj duono? Mi dankas... (*Al ĉiuj.*) La teatraĵoj de la franca Brieux postulas iom pli da atento, sed nur de la aktoro ludanta la rolon de la kuracisto... Ĉar vi bon escias, ke en ĉiu verko de Brieux estas kuracisto uzanta ĉiam teknikajn nomojn de malsanoj.

Jen, ekzemple, unu el tiuj kuracistoj akceptanta malsanulon.

(*Ŝajnigante doktoron parolantan al vizitanto.*) « Kion vi petas de mi, sinjoro...? Ha, bone, bone... mi komprenas.... Vi ankaŭ...? Ha, bone, bone... mi komprenas.... Vi ankaŭ...?! Sendube, vi estas fraŭlo, kaj vi intencas edziĝi, ĉu ne? Do, mi diros al vi, ke vi ne devas tion fari. Ne, ne, ne, tute ne!!! Petu de via fianĉino, ke ŝi atendu du, tri aŭ kvin jarojn... eble pli multe... kaj poste, se vi resaniĝos, vi edziĝos. »

(*Al publiko.*) Vi bone rimarkis, ke mi ne uzis la teknikan nomon

de la malsano... mi timis fari erarojn. Tion mi faris nur pro tio, kaj ne pro alia kaŭzo... (Al iu.) Kiun vi nomis? Tolstoj? Uf!

Pri Tolstoj estas bezone kelke da zorgoj, sed ne multaj. Sur la scenejon oni devas meti sanktan figuraĵon, al kiu ĉiu eniranta aktoro devas sin turni farante signon de kruco. Plie oni devas atenti pri la vestaĵoj; kompreneble, inteligenta aktoro ne devos eniri sur la scenejon kun pajla ĉapelo sur la kapo, kaj ventumilo en la mano.... Kontraŭe, li devas porti varmigajn felajn vestaĵojn kaj levi sian kolumon. Tiamaniere, la publiko tuj sentos la malvarmon de Rusujo, kaj pli bone komprenos la verkon. Jen : eee....

(Al la malfeliĉa sinjoro de la poŝhorloĝo.) Kioma horo estas? Ho, dek minutoj antaŭ la kvina? (Al ĉiuj.) Mi daŭrigos alian fojon, mi tuj lasas vin mi ne povas prokrasti.

Ha gesinjoroj, mia koro batas, bategas! Post dek minutoj, mia sorto aperos antaŭ mi nigre aŭ rozkolore desegnita.... Hodiaŭ mardon, je la kvina.... (Al iu.) Kion...? Kion vi diras? Ne!! Neeble!! Hodiaŭ estas Mardo.... Merkredo? Ĉu vi estas certa? Ĉu vi...? (Al ĉielo.) Dio, granda Dio !!! Jen la malsano de la dormemo !! Mi dormis senkonscie la tutan hieraŭan tagon !! (Al si mem.) Mi ne kuraĝas plu viziti tiun sinjoron, kiu atendas min de 24 horoj !! Kia perdo por la teatrarto !! Tamen ne. Mi devas klopodi. Mi iros al la sinjoro, mi rakontos al li la okazintaĵon... sed kiel diri al li, ke mi estas dormema?... Ho, mi rakontos ion ajn..., kaj se li ne volos min helpi, mi povos diri, ke mi ne atingis la gloron, ne pro la malbono de mia arto, sed pro mia bedaŭrinda malsano....

(Al ĉiuj.) Bonan vesperon. gesinjoroj, mi rapidas.

(Ekirinte.) Ha, se mi sukcesos, ĉar vi konas nun mian kapablecon, mi esperas, ke vi fariĝos ĉiuj klientoj de la « MUZOJ DEKLAMANTAJ ». (Aranĝas la ĉapelon, ŝetas per larĝa gesto la dekstran flankon de la mantelo sur sian maldekstran ŝultron kaj eliras majeste.)





TABELO DE LA ENHAVO

Al la legontoj.	1
Senhejmulo.	5
Pipamanto	9
Ĵonglisto	15
Fotografisto	21
Okaza artisto.	27

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto

EN ESPERANTO

La sola, kiu estas honorata de la konstanta kunlaborado

DE

D^{ro} L. L. ZAMENHOF

Aŭtoro de la lingvo Esperanto

Plej bonstila, zorge revidita, bele presita, akurate eldonata, **La Revuo** publikigas novelojn, teatraĵojn, romanojn, poeziojn, seriozajn studojn pri popolmoroj, historio, geografio, k. c. Ĉiu numero enhavas bibliografian parton kaj tutmondan kronikon.

Ĉiu numero havas 48 paĝojn da plej bona teksto!

ONI ABONAS :

- Francujo. — Librejo HACHETTE & K^o, 79, boulevard Saint-Germain, PARIS, unu numero 50 centimoj, jara abono. Fr. 6
- Danujo. — ANDR.-FRED HÖST & SÖN, Bredgade, 35, KJÖBENHAVN, unu numero 50 öre, jara abono. Kr. 4,50
- Germanujo kaj Aŭstrujo-Hungarujo. — ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 95, BERLIN, unu numero 45 pfenigoj, jara abono. M. 5
- Granda Britujo kaj kolonioj. — REVIEW OF REVIEWS, Norfolk street, LONDON W. C., unu numero 6 penc., jara abono. S. 6
- Hispanujo. — J. ESPASA, 579, calle de las Cortes, BARCELONA, jara abono . . . P. 8
- Italujo. — R. GIUSTI, 53, via Vittorio Emanuele, LIVORNO, unu numero 50 cent., jara abono L. 7
- Rusujo. — M. ARCT, Nowy Swiat, WARSZAWA, unu numero 25 kop., jara abono. R. 2,80
- Svedujo kaj Finnlando. — P. AHLBERG, 37, Surbrunnsgatan, STOCKHOLM, unu numero 50 öre, jara abono Kr. 4,50
- Por la landoj, kie ne estas abonejo, sin turni al firmo HACHETTE & K^o en PARIS; jara abono (por tiuj landoj) Fr. 7
-

Oni akceptas pagon de P abono nur per poŝtmandato aŭ ĉeko.